

Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio
Aperanta de 1949
Numero 393

Redakto-skipo

Direktado: Juanjo Vera

Kompostado: Jorge Pavón

Revizio: Miguel Hernández, Jesus García

Cano, Alejandro Pareja

[bulteno\(cxe\)esperanto.es](mailto:bulteno(cxe)esperanto.es)

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la respektivaj aŭtoroj

*La redakcio rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn

*Republikado de enhavo nur permesita kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro.

Hispana Esperanto Federacio

Federación Española de Esperanto

Rodríguez San Pedro 13, 3º, 7

ES-28015 Madrid

[admin\(ĉe\)esperanto.es](mailto:admin(ĉe)esperanto.es)

Konto en BBVA:

0182-1252-31-0204011961

Tel (34)914468079 (bv. lasu mesaĝon en la aŭtomata respondilo), 634 406 695 (nur lunde-vendrede inter 16:00 - 20:00).

Estraro:

Prezidanto: Pedro Hernández

Sekretario: Félix Manuel Jimenez

Kasisto: Raul Martinez

Voĉdonantoj: Miguel Hernández

(Junulara Sekcio), Juan Trenado Serrano

Presejo: Gráficas Aurora, Zaragoza
DL-Z-334-90

HEF-Bulteno 393

Ne io kio, brilas, utilas.

Antaŭparolo

Karaj legantoj,

En lasta numero aperis unua informo pri la 70a Hispana Kongreso, kiu okazos en San Lorenzo de El Escorial. En tiu ĉi numero vi povos trovi pli detalan informon pri ĝi.

La temo de ĉi tiu kongreso estos "Esperanto 3.0 – E-agado en la 21a jarcento", kiu elvokas la novajn teknologiojn kaj novajn rimedojn por komunikiĝi pere de interreto. Ni ne nur parolos pri interreto, kiun ni ne povas konsideri nova, sed ankaŭ pri reala revolucio en la maniero, kiel ni uzas ĝin, t.e., pri la novaj iloj lasttempe amase uzataj (*Facebook*, *Twitter*, kaj tiel plu). Ili ĝis nun permesis krei virtualajn komunumojn, tiel diversaj kaj viglaj, kiel tradiciaj komunumoj.

Esperanto povas kaj devas havi gravan rolon en tiu ĉi nova mondo.

Aldone, HEF unuafoje organizos ekzamenojn laŭ Komuna Eŭropa Referencadro dum la kongreso. Tiu ĉi estos bonega okazo por sukcesi havi la oficialan diplomon. Ni invitas vin aliĝi kaj partopreni nian kongreson; ĝui superban etoson en ĉarma urbeto.

Juan Trenado (membro de LKK)

Demizio de la prezidanto.....	3
Kandidatoj bezonataj por prezidanto kaj aliaj postenoj.....	3
Novaj dokumentoj de la biblioteko (2010).....	4
Raporto Estrarkunsido 2011-01-23.....	5
Raporto Estrarkunsido 2011-04-29	7
Asamblea General Ordinaria.....	8
Jar-raporto 2010	9
Cuenta de Pérdidas y Ganancias	14
Balance de situación.....	15
Presupuesto 2011	16
Esperanto en "El Mundo"	17
La unua esperanta kinofestivalo somere en Saŭ-Pablo.....	18
Akiri eksterlandajn merkatojn kaj partnerojn: Komerca filmeto.....	19
Jarmilaj evoluigaj celoj	20
UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj.....	22
Junularo aktivas en Hanojo	23
Gramatika kontrolilo por "Open Office".....	24
Podkastaro kaj Simpla Vortaro.....	25
Babiladoj en Katalunio.....	28
Brassens plu - Jacques Yvart.....	29
Vikio-kantaro.....	29
Hispana Kongreso de Esperanto	30
Oficialaj ekzamenoj.....	31
Ĉu vi volas prelegi dum la Kongreso?.....	32
Aliĝilo.....	posta kovrilo

Kovrila foto:

http://commons.wikimedia.org/wiki/File:Monastery_of_San_Lorenzo_de_El_Escorial.jpg

By R Barraez D'Lucca [CC-BY-2.0 (www.creativecommons.org/licenses/by/2.0)], Wikimedia Commons

Madrida Esperanto-Liceo,
MEL, havas novan retpaĝaron.
Ekde nun, vi povas aliri ĝin
per la sekva retadreso:
<http://www.esperanto.es/mel/>
Komentoj kaj sugestoj estas
bonvenaj.



nova poŝtelefono de HEF:
634406695



La 8an Aprilo la asocio SATEH inaŭguris sekcion de esperantaj libroj en Librejo Malatesta, strato Jesús y María, 24, Madrido. Prelegis Toño del Barrio, Miguel Fernández kaj Jorge Camacho. Oni povas mendi al ĝi librojn de la katalogo SATEH ekde iu ajn loko de Hispanio.

Demizio de la prezidanto

Al la Estraro de HEF:

Karaj geamikoj,

Mi skribas al vi mallonge por anonci, ke pro sankialoj, mi decidis demisii kiel prezidanto de HEF tuj post la Hispana Kongreso en San Lorenzo de El Escorial.

Mia sanstato ne novas, kvankam lastatempe mi suferis gravan krizon. La cetero de la Estraro jam da antaŭlonge konas mian problemon, kaj dum periodoj mi devis tute ne okupiĝi pri miaj taskoj, kvankam la aliaj estraranoj ĉiam kuraĝigis min ne demisii, kaj atendi la pliboniĝon de mia stato.

Kiel vi povas kompreni, en tiu situacio mi ne nur bezonas senbalastigi mian vivon por vivi pli trankvile, ankaŭ mi ne povas alpreni respondecojn, au taskojn, kiuj havas konkretajn limdatojn, ĉar mi ne povas garanti, kia estos mia stato estonte.

Mi esperas vian komprenemon. Mi klopodos plu agi por HEF, por Esperanto, kaj kunlabori tiagrade, kia permesas al mi mia malsano.

Kore,

Pedro Hernández

Kandidatoj bezonataj por prezidanto kaj aliaj postenoj de la estraro

La estraro de HEF petas al la interesataj anoj kandidatiĝi por la posteno de Prezidanto de HEF, kiu estos elektota dum la eksterordinara ĝenerala kunveno julio la 3an en Madrido (vidu la sekvontan alvokon). Ĉar nuntempe la posteno de Vicprezidanto estas neokupata, nepras elekti novan Prezidanton. Profitante la okazon, ni ankaŭ petas kandidatojn por aliaj du neokupataj estraranaj postenoj: Vicprezidanto kaj unu voĉdonanto, sed pensu, ke la ĉefa kialo de la elekto estas la posteno de Prezidanto. Bv. sendu viajn kandidatecojn indikante nomon, familiajn nomojn, D.N.I.-on kaj posteno al HEFa retpoŝta adreso admin(ĉe)esperanto.es, aŭ per ordinara poŝto al la oficejo de la asocio, antau la 3a de julio.

GRAVA RIMARKO: memoru, ke tamen la tuta estraro devos esti renovigota venontjare (2012) pro fino de kvarjara periodmandato, kaj tiam denove oni elektos ĉiujn postenojn.

La Sekretario,

Félix Manuel Jiménez Lobo.

Novaj dokumentoj en la biblioteko (2010)

100 Jahre Esperanto in Augsburg = 100 jaroj *Esperanto en Augsburg*. **Esperantolingvoklubo Augsburg**, 2008 (Donacita de Manolo Parra).

100 jarojn Esperanto en Munkeno. **Germana Esperanto-Kongreso**, 1948.

Astura Esperanta-Asocio centjara. **Astura Esperanta-Asocio**, 2009. (Donacita de Astura Esperanta-Asocio).

Chaoming, Cho. *Esperanto- ina vortareto*. 2010. (Donacita de Jorge Camacho)

Chaoming, Cho. *Esperanto- ina vortaro. Verda Ombro*, 2008. (Donacita de Jorge Camacho).

Cherpillod, André. *Etimologia vortaro de la propraj nomoj*. Universala Esperanto-Asocio, 2005. (Donacita de Miguel Gutiérrez Adúriz).

Cieszzyńskie Zakłady Kartoniarskie. *Telegra*.

Fang, Yuan. *Malatentema virino*. Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1983.

Fang, Yuan. *Ora hakilo*. Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1983.

Giang, Mi. *La avino-ursino*. Fremdlingva Eldonejo, 1979.

Gutiérrez Adúriz, Miguel. *Diccionario Amika vortaro*. Mga, 2010. (Donacita de Miguel Gutiérrez Adúriz).

He, Yanrong. *Sportistetoj*. Fremdlingva Eldonejo, 1979.

He, Youzhi. *Pesi elefanton*. El Popola Ĉinio, 1981. (Donacita de Madrida Esperanto-Liceo).

Hispana Esperanto-Federacio. Kongreso (69a. 2010. Santiago de Compostela). *La sanktejoj en la montaro Kii kaj ties pilgrimvojoj*. Galega Esperanto-Asocio, 2010. (Donacita de Madrida Esperanto-Liceo).

Johano de la Kruco, Sankta. **Sankta Johano de la Kruco**. (Enhavas: Vivanta amo-flamo; La nokto malluma; Spiritika kanto, versoj tra la animo kaj lia fianĉo). C. Mallia 2010. (Donacis Carmell Mallia).

Kaj Tiel Plu. *Surplacen venu vi = Sus la plaça venetz*. Vinilkosmo, 2009. (Donacita de Miguel Gutiérrez Adúriz).

Marco Botella, Antonio. *Crónicas del movimiento obrero esperantista*. Asociación Izquierda y Esperanto, 2009. (Donacita de Manolo Parra).

Nezha kirlas la maron. **El Popola Ĉinio**, 1980. (Donacita de Madrida Esperanto-Liceo).

Sayegh, Faye A. *u vi scias? : dudek bazaj faktoj pri la palestina problemo*. Research Center, Palestine Liberation Organization, 1967.

Schmid, H. Augsburg. *Loka Organiza Komitato de la 70a UK 1985, en kunlaboro kun la Trafikoficejo* (Verkehrsverein) Augsburg, 1985. (Donacita de Manolo Parra).

Torras i Tutusaus, Arnau. *La vivo*

simples! A. Torras, 2004. (Donacita de Jorge Camacho).

Torras i Tutusaus, Arnau. *Malpli da teksto kaj pli da sekso.* A. Torras, 2004. (Donacita de Jorge Camacho).

Umesao, Tadao. *Esplorado en Japanio.* Internacia Fako de Oomoto, 19—. (Donacita de Jorge Camacho).

Vidal, Dominique. *Kiel Israelo elpelis la palestinanojn.* Monda Asembleo Socia, 2009. (Donacita de Jorge Camacho).

Wang, Zhenhua. *Vostokonkurso.* Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1983. (Donacita de Madrida Esperanto-Liceo).

Yang, Yi. *ion faru mem ni iuj.* Fremdlingva Eldonejo, 1979. (Donacita de Madrida Esperanto-Liceo).

Ĝustigo

➤ Erare oni menciis en Boletín, n. 390 ke la komputilan k-diskon Esperanto y traducción aĉetis HEF. Fakte ĝin donacis la Esperanto-Grupo Fido kaj Espero.

Raporto Estrarkunsido 2011-01-23

Loko: Oficejo de HEF

Partoprenantoj: Pedro Hernández - Prezidanto, Raúl Martínez (Kasisto), Juan Trenado (Voĉdonanto) kaj Félix M. Jiménez (Sekretario)

1.-Kontoj kaj raporto 2010, buĝeto 2011

➤ La kasisto pretigos la kontojn de 2010 por la komenco de februaro kaj la sekretario la raporton 2010 por la fino de ankaŭ tiu monato. La buĝeto por 2011 estos preta kune kun la kontoj 2010.

2.-Boletín n-ro 392

➤ Jam estas tempo eldoni kaj sendi al la anoj alian numeron de “Boletín”. La sekretario kontaktos kun la redaktora skipo por scii pri la stato de la n-ro 392.

3.-Ordinara ĝenerala kunveno 2011.

➤ Oni kalkulas fari tiun kunvenon aprile au maje, ĉefe por aprobi (aŭ ne) la supre menciitajn dokumentojn.

4.-Poŝtelefono de HEF por “deĵori” eksteroficeje.

➤ Oni esploras eblecon aĉeti poŝtelefonon por HEF, por povi ricevi rekte telefonvokojn, vidante la problemon de la horfiksa deĵorado en la oficejo. Eblas aĉeti poŝtelefonon kontraŭ 25 €, Pedro aĉetos kaj Raúl zorgos pri ĝi. Oni kontrolos la jaran elspezon.

5.-Respondeculoj pri konkretaj taskoj.

➤ Denove aperas la problemoj havi (aŭ

ne) homojn dediĉotajn al konkretaj taskoj. La estraranoj ne povas zorgi pri ĉio, ĉar ili jam havas kutime sufiĉajn burokratajn taskojn por fari. La ĉefa grava tasko kiu celas eksterestrarana respondeculo estas “eksteraj rilatoj”, por kontakti kun ĵurnalistojn, amasmediojn, ktp. Tiu homo devus zorgi la retadreso prensa@esperanto.es kaj kunordigi la petojn de informo el ĵurnalistoj. Teorie Manolo Pancorbo zorgas pri la menciita retadreso, kaj Toño del Barrio kutime preparas notojn por ĵurnaloj, sed Pedro demandas al ili, kiu serioze volas preni la respondecon. Tio ne signifos, ke ekz. tiuj homoj ĉiam estos intervuoataj, sed ili solvos ĉiu situacio laŭnecese.

6.-Projekto 2011

➤Ĉi jare daŭre ekspozicio la paneloj pri e-o en kelkaj kulturcentroj (aŭ similaj) tra la tuta ŝtato. En Madrido (urbo) estos almenaŭ du ekspozicioj, kaj unu pli dum HK2011 en San Lorenzo de El Escorial. Oni faros peton al asocioj kaj anoj por esplori eblecon havi pli da ekspozicioj ekstermadride. HEF pagos la sendokostojn de la materialoj kaj sendos inform-broŝurojn, kaj la loka zorganto respondecos pri la serĉado de ejo kaj muntado kaj malmuntado.

7.-Kursoj en Madrido

➤Oni planas fari komencan kaj progresigan kursojn. Oni petos informojn de la asocioj por scii pri kursoj en aliaj provincoj.

8.-Iberia Renkontiĝo 2011:

➤Ĉi-jare ĝi okazos en Katalunio, organizota de KEJ (Kataluna Esperanta Junularo). HEJS kunlaboros.

9.-Ĉefdelegito de HEF en UEA.

➤Ankoraŭ HEF ne ricevis proponon de iu por esti ĉefdelegito de UEA en Hispanio. Pedro Hernández sinproponas, li kontaktos kun Osmo Buller por scii ĉu ĝi estas kongrua ĉar li (Pedro) jam estas delegito en Madrido.

10.-Hispana Kongreso 2011.

➤ La LKK kunvenis ankaŭ hodiaŭ kaj informis, ke la demarŝoj bone marŝas. La datoj estos el mardo junio la 28an ĝis dimanĉo julio la 3an. Jam estas kongresejo, kulturcentro el la Urbodomo. Oni trovis gastejon kaj junulargastejon por faciligi la loĝadon, kvankam la LKK ne zorgos pri ĝi. La programo ankaŭ estos riĉa (prelegoj, kursoj, koncertoj, ekskursoj), kaj eĉ ekzistos ebleco fari la oficialajn ekzamenojn de KER (oficiale rekonitaj de Eŭropaj Organizoj). La aliĝilo kaj kotizo baldaŭ estos en la repaĝo kaj aperos en la Boletín n-ro 392.

11.-Aliaj aferoj

➤Pedro proponas por estontaj hispanaj kongresoj, fari ĉiun duan jaron en aŭ apud Madrido (ne pli for ol 200 km) kaj la aliaj jaroj aliloke, kaj proponi la lokon

almenaŭ du jaroj antaŭ. Ekz. por 2012 oni jam devas pripensi, oni esploros ebleco fari ĝin en ekz. Kantabrio.

➤ Servo de interreta paĝaro: Ĝis nun la ret-paĝaro estas en servilo kiun pagis la entrepreno de Miguel Ángel Sancho, sed la spaco kiun ni disponas estas nesufiĉa por enhavi la novan ciferecan bibliotekon kaj post unu jaro ĝi ne estos disponebla. Ni bezonas alian servilon. Miguel Ángel Sancho trovis servilon kontraŭ maksimume 600 € jare. La estraro aprobas la elspezon malgraŭ la alta prezo, konsiderante ke la paĝaro kaj biblioteko estas nepraj kaj gravaj por la celoj de HEF.

➤ Nova banko: La estraro tute ne kontentas kun la servo de la nuna banko (BBVA) kaj aprobas la malfermon de novan konton en Triodos Bank, kiu estas “etika banko”, pli kongrua kun la filozofio de HEF. Félix malfermos konton kaj iom post iom HEF migros al ĝi.

La sekretario



Raporto Estrarkunsido 2011-04-29

➤ Loko: Oficejo de HEF
➤ Partoprenantoj: Pedro Hernández-Prezidanto, Raúl Martínez (Kasisto), Juan Trenado (Voĉdonanto), kaj Félix M. Jiménez (Sekretario).

1.- Kontoj kaj raporto 2010, buĝeto 2011:

➤ La kasisto prezentas la kontojn 2010 kaj la buĝeton 2011, kaj la sekretario la raporton 2011. La Estraro aprobas ilin, kaj sekve prezentos al la anaro dum la ordinara ĝenerala kunveno.

2.- Ordinara Ĝenerala Kunveno 2011

➤ La Estraro decidis alvoki la anojn al

kunveno majo la 20an, por aprobi la suprajn menciitajn dokumentojn. La alvokon kaj tagordon estos sendotaj al la anaro poŝte.

3.- Demisio

➤ La Prezidanto prezentas al la Estraro demisileteron, kiun lin decidis pro sanaj kaj personaj kialoj. La Estraro akceptas ĝin, kaj traktos la aferon kun la anaro dum la kunveno de majo la 20an. Sekve la Estraro petos kandidatojn por anstataŭigi la Prezidanton kaj elekti novan, ĉar la posteno de Vicprezidanto estas malplena kaj oni ne povas fari la anstataŭon aŭtomate. Nepre oni devas elekti novan Prezidanton dum HK por ne lasi la asocion en neregula situacio.

4.- Eksterordinara Ĝenerala Kunveno 2011 dum la Hispana Kongreso:

➤Profitante la HK 2011, la Estraro alvokos al Eksterordinara Ĝenerala Kunveno, dum kiu oni traktos aferoj kiel la elekton de nova Prezidanto, la Projekton 2011, kaj la informon pri la anoj 2011.

5.- Delego

➤Konforme al la artikolo 24 el la Statuto de la Asocio, La nuna Prezidanto delegas iliajn funkciojn al la ano Juan Trenado (Voĉdonanto de la Estraro) por prezidi kaj la ordinaran ĝeneralan kunvenon majo la 20an, kaj la eksterordinaran ĝeneralan kunvenon julio la 3an. Tiu delego estas ekskluzive por la menciitaj kunvenoj kaj ne por la agado de la prezidanto dum la kutima demarŝo de la asocio, kiu ĝis la elekto de nova prezidanto restas ĉesigata.

La sekretario

Asamblea General Ordinaria

El Presidente les invita a asistir a la Asamblea General Ordinaria, que tendrá lugar el viernes 20 de mayo de 2010, a las 18:30 horas (a las 19:00 en segunda convocatoria) en las oficinas de la asociación, calle Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7, Madrid, con el siguiente orden del día:

1.- Lectura y aprobación del acta de la anterior asamblea (julio 2010).

2.- Aprobación de las cuentas y Tesorería del 2010.

3.- Aprobación de la Memoria de actividades de 2010.

4.- Aprobación del Presupuesto para 2011.

5.- Dimisión del Presidente.

6.- Ruegos y preguntas.

IMPORTANTE: Los miembros de la Federación que deseen ser representados por algún otro socio, por favor que envíen un mensaje comunicándolo, indicando claramente el nombre completo del representante y representado, al buzón electrónico *admin@esperanto.es*, o bien por correo postal a las oficinas de la asociación, antes del 20 de mayo.

El Presidente de HEF
Pedro Hernández

Ordinara Ĝenerala Kunveno

La Prezidanto alvokas vin ĉeesti Ordinaran Ĝeneralan Kunvenon, kiu okazos la 20-an de majo de 2010 (vendredo), je la 18:00 horo (je la 18:30 horo dua alvoko), en la oficejo de la asocio, strato Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7, Madrido, laŭ la jena tagordo:

1.- Legado kaj aprobo de la protokolon de la antaŭa kunveno (julio 2010).

2.- Aprobo de la kontoj kaj kas-stato de 2010.

3.- Aprobo de la Raporto pri aktivaĵoj de 2010.

4.- Aprobo de la Buĝeto por 2011.

5.- Demisio de la Prezidanto.

6.- Sugestoj kaj demandoj.

GRAVA RIMARKO: La membroj de HEF, kiuj deziras esti reprezentataj fare de iu alia membro, bonvolu transdoni mesaĝon informante pri tio, klare indikante la kompleta nomo de la reprezentanto kaj de la reprezentato, al

HEFa retroŝta adreso *admin@esperanto.es*, aŭ per ordinara poŝto al la oficejon de la asocio, antaŭ la 20a de majo.

La Prezidanto de HEF
Pedro Hernández

Raporto de aktivajoj 2010

1. Administrado

- 1.1. Ne okazis ŝanĝoj en la estraro dum la jaro. La estraro regule kunsidis.
- 1.2. La plibonigado de la administrado de la asocio daŭris dum 2010: oni reorganizis la informadikajn arĥivojn.
- 1.3. Okazis du ĝeneralaj kunvenoj: Ordinara (majo la 13an) en Madrido por la aprobo de kontojn kaj memoron 2009, kaj Eksterordinara (julio la 4an) en Santiago de Kompostela dum la HK2010.

2. Perioda eldonado

- 2.1. Oni eldonis tri numerojn de “Boletín”.

3. Kursoj

- 3.1. Membroj (individuaĵoj kaj asocioj) de HEF gvidis kursojn en kelkaj urboj tra la tuta ŝtato. La Prezidanto mem, Pedro Hernández, organizis kurson en la sidejo de la Asocio en Madrido.

4. Kongresoj kaj renkontiĝoj

- 4.1. EMAS (Esperanto Kastilia-Manĉa Asocio) kaj HEJS (Junulara Sekcio de HEF) kunorganizis IRO-10 en Almagro (Ciudad Real) kune kun PEJ (Portugala Esperanto Junularo) kaj KEJ (Kataluna Esperanto Junularo), 9a-11a aprilo. Kvardek partoprenantoj ĝuis la lokajn historion kaj vinon, vizitis la nacian naturparkon Las Tablas de Daimiel, ludis, debatis, konis pri novaperintaj libroj, kaj spektis etan teatraĵon en la XVIIjarcenta Corral de Comedias, en kiu la geaktoroj aparte salutis nin la esperantistojn. Pri la evento bone raportis la du provincaj ĵurnaloj, kelkaj regionaj televidkanaloj kaj la hispana nacia radio RNE.
- 4.2. Dek du anoj de Kataluna Esperanto Fervojista Asocio partoprenis en la 62-a IFEF Kongreso en Sofio (Bulgario), majo la 9an.
- 4.3. Organizado de la 69a Hispana

- Kongreso de Esperanto en Santiago de Compostela, kune kun Galega Esperanto Asocio. De la 2a ĝis la 5a julio. Kunvenis pli ol 50 esperantistoj, ne nur hispanaj. Okazis, inter aliaj, prelegoj, kursoj de E-o kaj galega, vizito al la domo-muzeo de Rosalía de, ekskurso tra la rio de Arousa kun abunda bankedo de mituloj kaj vino, vizito al la urbo gvidata, viziton al Museo de la Galega Popolo, kaj la Pilgrima Muzeo.
- 4.4. Membroj de HEF partoprenis en la 95-a UK en Havano (Kubo), inter la 25a de julio kaj la 1-a de aŭgusto. Rafaela Urueña prelegis. Oficiale HEF estis reprezentita de Luis Hernández kiel komitatano A antaŭ UEA.
- 4.5. En la 77^a Itala Kongreso de E-o en Sabbiadoro (21^a-28^a aŭgusto) partoprenis kelkaj membroj de HEF
- 4.6. De la 2a ĝis la 9a Oktobro 2010 okazis la 18a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo en Coma-Ruga (El Vendrell, Baix Penedès, Tarragona). Partoprenis 131 homoj el 11 landoj.
- 4.7. Membroj de HEF partoprenis en la 15a Andaluzia Kongreso de Esperanto, kiu okazis en Jaén inter la tagoj 30a de oktobro kaj 1a de novembro 2010.
- 4.8. 108^a babilado en Premià del Mar, 21^a novembro, organizita de BEC. Partoprenis 26 homoj. La temo estis "La ĉelo artefarita".
- 4.9. Augusto Casquero partoprenis en "La Komuna Seminario" de la 18a ĝis la 20a de decembro 2010 en Hanojo (Vietnamio) ege interesa junulara aranĝo, kies ĉefa celo estas unuigi esperantan junularon, ĉefe de la aziaj landoj.
- 4.10. Zamenhof Tago: Dum kelkaj tagoj ĉirkaŭ decembro la 15an, kelkaj asocioj aliĝitaj al HEF festis la zamenhofan tagon tra la tuta ŝtato, farante prelegojn, komunajn manĝadojn, ktp.
- 4.11. Membroj de HEF partoprenis en la 27^a IF okazinta en Nördlingen (Germanio), el 27 adecembro 2010 ĝis 3a januaro 2011.
5. Disvastigo I: ekspozicioj, prelegoj, foiroj.
- 5.1. Organizita de Kultura Asocio Esperantista de Katalunio kaj aliaj E-grupoj, okazis la dimanĉon 21an de marto babilado pri la temo "Alianco de civilizacioj", en Castelldefels.
- 5.2. Aprilo la 18an okazis la 104^a Babilado en la sidejo de Barcelona Esperanto Centro organizita komune far pluraj E-grupoj de Barcelono. Rafaela Urueña, de la Grupo Esperanto de Valadolido, prelegis pri "Utopio kaj realeco"
- 5.3. Miguel Fernández prelegis pri la poeto Miguel Hernández la 4an de majo en la mezlernejo "Eijo y Garay" en Madrido. Li legis kelkajn poemoj de la poeto, kelkaj el ili tradukitaj en esperanton.

5.4. Majo la 24^a en Valadolido Rafaela Uruña prelegis pri “Esperanto, idioma ecológico” (E-o, ekologia lingvo) kadre de la Programo de la Universitato de la Sperto.

5.5. La 5-a de junio en Barcelona, Barcelona Esperanto Centro partoprenis en la foiro *Firentitas* pere de budo, informante pri UEA kaj E-o.

5.6. Membro de HEF sed nome de SATeH (Pedro Sanz, Miguel Fernández kaj Jorge Camacho) prelegis pri E-o en la sidejo de CNT en Ciudad Real oktobro la 23an.

5.7. De la 1-a ĝis la 31-a de oktobro okazis la ekspozicio "Esperanto: desafío a Babel" en la madrida urbodoma kulturejo *Centro Cultural Santa Petronila*, kvartalo Villaverde. Temis pri la 16 paneloj pendebraj, supraĵe montrantaj la diversajn aspektojn de la esperantaj lingvo kaj kulturo, kiu jam vizitis Malagon, Gvadalaharon, Almagron kaj aliajn kvartalojn de Madrido.

5.8. Oktobro la 24an la Prezidanto de KantEA (asocio membro de HEF) prelegis pri “El esperanto: una apuesta por la paz” kadre de la “Semana de la Paz” (Paco-Semajno) ĉe la “Biblioteca Central de Cantabria” (Centra Biblioteko de Kantabrio) en Santander.

5.9. Decembro la 9an Miguel Fernández prelegis pri Miguel Hernández kaj deklamis liajn poemojn en Vitoria-Gasteiz invitita de la loka grupo de *Izquierda Unida* kadre de la cent-jara jubileo de la naskiĝo de la poeto.

Miguel ankaŭ koncize prezentis la internacian lingvon.

6. Disvastigo II: aliaj

6.1. Kelkaj membroj daŭre kontribuis al la redaktado de Vikipedio en e-o, ĉu pere de nova artikoloj, ĉu plibonigante iujn jam ekzistantaj.

6.2. SATeH eldonis la libron “Crónicas del movimiento obrero esperantista”, en la hispana, verkita de Antonio Marco Botella, membro de HEF.

6.3. Dum la jara legado de “El Quijote” en la madrida “Círculo de Bellas Artes”, Miguel Fernández kaj Faustino Castaños (membro de Astura Esperanto Asocio) legis esperante parton de la 29-a ĉapitro.

6.4. Grupo Esperanto de Valadolido daŭre disvastigis la elektronikan libron “Esperanto y traducción: utopía y realidad” (eldonita pasintjare de la Diputación de Soria) en bibliotekoj de Valadolido.

6.5. Toño del Barrio, membro de HEF, kunlaboris en la verkado de la libro “Història de l’Esperanto als Països Catalans” (Historio de E-o en la Kataluna Landaro) eldonita de KEA (Kataluna E-Asocio), pere de du artikoloj.

6.6. Aperis la dua eldono de la vortaro “Amika” (dulingva hispana-esperanto) eldonita de Miguel Gutiérrez Adúriz.

6.7. Aŭgusto Casquero, ano de HEF, daŭre instruas e-on en Ĉinio dum 2010. Dum

kajo gvidis kurson en la urbo Kantono, ĉe la Universitato Baiyun.

7. Amasmedioj

7.1. La 21an de februaro, okaze de la internacia tago de la gepatra lingvo, la regiona televido de Kastilio-Leono elsendis etan raporton pri Esperanto. Parolis kvar elstaraj esperantistoj de Valadolido.

7.2. La tagon 4an marto la novaĵagentejo EFE dissendis raporton pri Esperanto en Ĉinio, sekve de kiu poste informis multaj ĵurnaloj kiel ekzemple la senpaga ADN.

7.3. La publika tutnacia televido TVE1 elsendis raporton pri Esperanto la

dimanĉon majo 13an. La raporto daŭris tri minutojn kaj enhavis mencion al malnovaj raportoĵ pri e-o de la sepdekaj jaroj de la XXa jarcento, kune kun nunaj intervuoĵ al samideanoĵ el urbeto Cheste (Valencio) kaj el Madrido.

7.4. Toño del Barrio estis intervuoata dum kvarona horo en la radiostacio "esRadio", la 20-an de junio, dimanĉe matene.

7.5. Longa artikolo pri Esperanto aperis la 9an de julio en la ĵurnalo "Levante", de Valencio. Ĝi rilatis al la okazigo en Cheste de la Valencian E-a renkontiĝo la sekvajn du tagojn.

7.6. En la regiona radio de Aragono, "Aragón Radio" la 23an de septembro oni parolis pri Esperanto, kun la

partopreno de Pedro Hernández kaj Eduardo Berdor.

7.7. La duan de oktobro la ĵurnalo "Deia" publikigis artikolon pri Esperanto kaj pri la E-Grupo de Bilbao, intervuoante ĝian sekretarion Jesús M. García Iturrioz.

8. Interreto

8.1. Daĝras la plibonigo de la retpagxaro de HEF. Ĝi jam nepras kaj por la bona funkciado de la asocio, kaj por la disvastigo de la lingvo en la ŝtato.

8.2. Barcelona Esperanto-Centro (BEC) kreis blogon en interreto por informi pri e-o: <http://esperantokomun.ikilobarcelono.blogspot.com>

8.3. Kantabra E-Asocio (KantEA) renovigis ĝian retpaĝaron.

9. Biblioteko

9.1. Ĝi daŭre estas alirebla de cxiuj, tamen nur HEF-anoĵ rajtas pruntpreni. La katalogo estas disponebla pere de la HEF-retpaĝo. Dum 2010 novaj ekzempleroĵ estis aldonitaj al la kolekto.

9.2. Projekto Bitoteko: Dum 2010 la projekto daŭris. Pli kaj pli, gravaj dokumentoĵ kaj revuoĵ de la Biblioteko "Juan Regulo Pérez" estas bitigitaj.

10. Asocioĵ

10.1. 25^a datreveno de KantEA (Kantabra E-Asocio).

11. Kunlaboro kun oficialaj instancoj kaj privatuloj

11.1. Kadre de la Projekto “Comenius” (kiu faciligas interŝanĝojn inter gestudentoj de eŭropaj landoj), okazis inter la 10^a kaj 16^a de aprilo la tria renkontiĝo en Don Benito (Ekstremaduro), post tiuj de Italio kaj Portugalio, de gestudentoj de tri lernejoj de la tri landoj, kies reprezentanto por Hispanio estas la mezlernejo “Cuatro Caminos” de tiu ekstremadura urbo, danke al la agado de nia membro Kani, kiu instruas tie.

11.2. La elektronika biblioteko de la Diputación de Soria eldonis kompaktan diskon, “Esperanto y traducción: utopía y realidad”. Inter aliaj ĝi enhavas prelegojn de Rafaela Uruña, Pedro Garrote kaj Rodrigo Portela, de Valladolid, ĉiuj membroj de HEF.

11.3. Fundación Esperanto atingis interkonsenton kun Caja Navarra por helpi la disvastigadon de la internacian lingvon: la klientoj de la ŝparkaso Caja Navarra povas elekti projekton pri E-kursoj por dediĉi al tiu celo parton el la profitoj kiujn obtenas Caja Navarra pere de la rimedoj de la kliento. Temas pri la senpagaj ĉeestaj kursoj farataj en la sidejo de Fundación Esperanto en Zaragoza. Do, klientoj de tiu ŝparkaso povas elekti kaj apogi jenan projekton.

11.4. En aŭgusto, HEF donacis al la “Biblioteca Nacional” (Nacia Biblioteko) ekzempleron de “Don Kihoto” (traduko de F. de Diego),

“Don Kihoto parolas E-on” kaj kolekton de turismajn broŝurojn pri Hispanio en E-o.

12. Aliaj aktivaĵoj

12.1. Omaĝo al la poeto Miguel Hernández okazis sabate la 12an majo ĉe monumento dediĉita al nun jubileata poeto Miguel Hernández en la “Parque del Oeste” (Okcidenta Parko) en Madrido. Oni legis serion da poemoj, kaj en sia originalo kaj en esperanto, en la voĉoj de Ana Manero kaj Miguel Fernández, la tradukinto. Kunvenis ĉirkaŭ kvardek homoj.

12.2. Kadre de la maratono de rakontoj de Gvadalaĥaro okazanta en la “Palacio del Infantado”, la dimanĉon 13an majo Raúl Martínez partoprenis per mallonga rakonto en Esperanto.

12.3. Kelkajn tagojn antaŭ la U.K. oni sendis al Kuba E-Asocio pakajon da libroj, pezantan 6,7 kg. La librojn donacis parte HEF kaj parte Madrida E-Liceo (MEL), kaj la sendokoston pagis Fundación Esperanto.

12.4. Miguel Gutiérrez, membro de HEF, membras ankaŭ en la Akademio de Esperanto.

Originalo subskribita de la sekretario Félix Manuel Jiménez Lobo.

Cuenta de Pérdidas y Ganancias

	<u>2010</u>	<u>2009</u>
A) GASTOS	9.748,48	6.222,55
1. Aprovisionamientos	1.112,86	-43,78
600. Compra de Libros y Materiales	777,09	165,00
610. Variación Existencias	335,77	-208,78
2. Servicios Exteriores	8.629,52	6.266,33
622. Reparaciones y Conservación	9,00	148,89
625. Seguro	89,58	87,01
626. Comisiones Bancarias	294,77	283,44
627. Publicidad, Propaganda y Fines Sociales	6.297,06	3.745,40
a) Boletín	1.708,14	2.213,04
b) Apoyo Grupo de Bilbao	4.500,00	0,00
c) Donativos Libros	10,00	0,00
d) Congresos y Encuentros	47,91	550,00
f) Mantenimiento Página Web	31,01	30,74
g) Exposiciones	0,00	862,60
h) Folletos y Propaganda	0,00	89,02
628. Suministros (Electricidad)	129,53	125,22
629. Otros Servicios	1.809,58	1.863,48
a) Cuota UEA	165,60	131,00
b) Comunidad de Vecinos	891,18	494,28
c) Teléfono e Internet	639,86	636,74
d) Correo	112,94	113,46
e) Material Oficina	0,00	75,50
f) Suscripción Revistas	0,00	37,36
g) Gastos Varios	0,00	375,14
631. Tributos	0,00	12,89
3. Gastos Financieros	6,10	0,00
669. Intereses Bancos	6,10	0,00
B) INGRESOS	10.989,09	8.053,93
1. Ingresos de la Actividad Propia	10.463,00	7.013,00
721. Cuotas de Socios y Congresos	5.951,00	6.985,00
726. Aportaciones Grupo Bilbao	4.500,00	0,00
726. Donaciones Otros Socios	12,00	28,00
2. Otros Ingresos	445,82	472,15
759. Prestaciones Servicios (Venta de libros, cursos...)	445,82	472,15
3. Ingresos Financieros	80,27	568,78
769. Intereses Depósito BBVA	80,27	568,78
RESULTADO	1.240,61	1.831,38

Balance de situación

Activo	<u>2010</u>	<u>2009</u>
A) ACTIVO NO CORRIENTE	62.390,91	62.390,91
II. Inmovilizado material	62.390,91	62.390,91
1. Terrenos y construcciones	60.101,21	60.101,21
211. Construcciones	60.101,21	60.101,21
2. Otro inmovilizado material	2.289,70	2.289,70
232. Biblioteca	2.289,70	2.289,70
B) ACTIVO CORRIENTE	36.375,31	34.563,31
II. Existencias	2.797,61	3.133,38
1. Comerciales	2.797,61	3.133,38
300. Libros y material diverso	2.797,61	3.133,38
V. Inversiones financieras a corto plazo	23.000,00	23.000,00
5. Otros activos financieros	23.000,00	23.000,00
566. Depósitos constituidos a corto plazo	23.000,00	23.000,00
VII. Efectivo y otros activos líquidos equivalentes	10.577,70	8.429,93
1. Tesorería	10.577,70	8.429,93
570. Caja, euros	273,24	236,85
572. Cuenta en UEA	131,33	265,93
572. Bancos e inst. de crédito c/c vista, euros	10.173,13	7.927,15
TOTAL ACTIVO	98.766,22	96.954,22
Pasivo		
A) PATRIMONIO NETO	98.194,83	96.954,22
A1) Fondos propios	98.194,83	96.954,22
I. Capital	96.954,22	95.122,84
101. Fondo Social	96.954,22	95.122,84
VII. Resultado del ejercicio	1.240,61	1.831,38
129. Resultado del ejercicio	1.240,61	1.831,38
C) PASIVO CORRIENTE	571,39	-
V. Acreedores comerciales y otras cuentas a pagar	571,39	-
3. Acreedores varios	571,39	-
410. Acreedores por prestaciones de servicios	571,39	-
TOTAL PATRIMONIO NETO Y PASIVO	98.766,22	96.954,22

Presupuesto para 2011

1. Ingresos Afectos a la Actividad	6.550,00
b) Prestaciones de servicios (Venta de libros, Cursos...)	450,00
c) Ingresos de Gestión Corriente (Cuotas y Congresos)	6.100,00
4. Aprovisionamientos-	-300,00
a) Consumo y variación de mercaderías (Libros)	-300,00
5. Otros Ingresos de la Actividad---	50,00
b) Subvenciones, Donaciones y Legados	50,00
7. Otros Gastos de la Actividad-	-6.500,00
a) Servicios Exteriores	-6.470,00
a2) Rep. y Conservación (Incluido el Servidor)-	-700,00
a5) Primas de Seguros-	- 95,00
a6) Servicios Bancarios y Similares	- 310,00
a7) Publicidad, Propaganda y Relaciones Públicas	- 3.440,00
a8) Suministros-	-225,00
a9) Otros Servicios	.700,00
b) Tributos	-30,00
A.1) RESULTADO DE LA ACTIVIDAD	-200,00
12. Ingresos Financieros	200,00
b2) De Instrumentos Financieros en Terceros	200,00
A.2) RESULTADO FINANCIERO	200,00
A.3) RESULTADO ANTES DE IMPUESTOS	—
A.4) RESULTADO PROCEDENTE DE OPERACIONES CONTINUADAS	—
-	
A.5) RESULTADO DEL EJERCICIO	—

Esperanto en *El Mundo*

La 31-an de januaro aperis en la januara numero de la madrida kajero de la ĵurnalo “El Mundo” intervjuo kun la direktoro de Fundación Esperanto, Toño del Barrio. Ĝi okupis preskaŭ la tutan lastan paĝon de tiu suplemento, ene de sekcio nomata “Con mucha cara” (“Malmulthonte”), kiu ĉiutage aperigas intervjuojn ne tre seriozajn, pri aferoj interesaj aŭ kuriozaj, kaj fokusigitajn ankaŭ sur la persono mem.

Ĉikaze la neformalecon oni povas konstati jam ĉe la foto, kiu serĉis ion montrantan la vizaĝon de la intervjuito, kaj samtempe kun rilato al Esperanto. Ankaŭ la titolo estas iom anekdota, ĉar ĝi aludas al la ebleco fari ŝercojn en Esperanto. Tamen, la cetero de la intervjuo estis sufiĉe profesieca, kun aludo al diversaj trajtoj, ne ĉiam kutimaj, sed honestas, pri Esperanto.

La intervjuo vekis la atenton almenaŭ de aliaj ĵurnalistoj, kaj sekve de tio Toño estis denove intervjuita la 8-an de februaro, dum dudek minutoj en la Internacia Servo de la Ŝtata Radio de Hispanio (Radio Exterior de España), en la programo “Puntos de vista” (Vidpunktoj).

Du tagojn poste, la 10-an de februaro, oni vokis nin denove, ĉi-foje de Radio Nacional de España, de la programo “Esto me suena”, kie oni intervjuis dum dek minutoj la prezidanton de HEF, Pedro Hernández.

Antonio del Barrio

El Mundo,
31an de januaro

CON MUCHA CARA / «Es como mejorar la pronunciación con los de los países hispanohablantes...»

JOSÉ ANTONIO BARRIO / DIRECTOR DE LA FUNDACIÓN ESPERANTO
«Tenemos un 'Lepe' en esperanto»

¿Por qué se llama 'Lepe'?
Es una palabra que se usa para referirse a alguien que habla mal un idioma. En este caso, se refiere a la mala pronunciación de algunas palabras en esperanto.

¿Cómo se mejora la pronunciación?
Se mejora escuchando a hablantes nativos o con mucha experiencia, como los hispanohablantes.

¿Por qué es importante tener un 'Lepe' en esperanto?
Porque ayuda a los aprendices a mejorar su pronunciación y a entender mejor a los hablantes nativos.

¿Qué es el 'Lepe' en esperanto?
Es una palabra que se usa para referirse a alguien que habla mal un idioma.

¿Por qué se llama 'Lepe'?
Es una palabra que se usa para referirse a alguien que habla mal un idioma.

¿Cómo se mejora la pronunciación?
Se mejora escuchando a hablantes nativos o con mucha experiencia, como los hispanohablantes.

¿Por qué es importante tener un 'Lepe' en esperanto?
Porque ayuda a los aprendices a mejorar su pronunciación y a entender mejor a los hablantes nativos.

¿Qué es el 'Lepe' en esperanto?
Es una palabra que se usa para referirse a alguien que habla mal un idioma.

La unua Esperanta Kinofestivalo somere en San-Paŭlo

De la 10-a ĝis la 13-a de julio en San-Paŭlo, Brazilo okazos la unua Esperanta Kinofestivalo, dum kiu estos prezentitaj konkursaj kaj nekonkursaj filmoj. Plej bonajn filmojn pri Esperanto kaj en Esperanto povus spekti vizitantoj de kinofestivalo el pli ol 20 landoj.

La kinofestivalo de Esperantaj filmoj konsistos el du programoj: konkursa kaj nekonkursaj. En la konkursa programo partoprenos mallongegaj filmoj kun daŭro 5, 15 aŭ 30 sekundoj, kiuj havas trajtojn de filmo (enhavo, ideo, senco) kaj originale kreitaj por kinofestivalo en la internacia lingvo Esperanto. La kvin plej bonaj filmetoj, elektotaj de internacia ĵurio, konsistanta el E-artistoj kaj E-aktivuloj, feliĉigos siajn kreantojn per fama mp3-ludilo Apple iPod Touch 4 kun gravurado de kinofestivalo, kaj filmaj gajnintoj estos prezentitaj al spektantoj el pli ol 120 landoj.

La nekonkursaj programoj prezentos dokumentaĵojn kaj ludfilmojn kun voĉtraduko aŭ subtekstoj en Esperanto. En Esperanto-parto la organizantoj donos superrigardon pri moderna E-kinarto kaj prezentos aktualajn filmojn pri kaj en Esperanto. La ĝeneralan parton de nekonkursaj programoj partoprenos konataj filmoj, premiitaj dum grandaj internaciaj kinofestivaloj de lastaj jaroj.

La kinofestivalo okazos samtempe kun tri grandaj Esperanto-kongresoj. Ĝiaj partoprenantoj el pli ol 20 landoj havos ŝancon samtempe kun la kongresoj sekvi la konkursan programon kaj ĝui filmojn

de nekonkursaj programoj akompane de aliaj artaj vesperaj prezentadoj. Inter gastoj kaj amikoj de la kinofestivalo estas konataj filmofarantoj, reĝisoroj, aktoroj kaj pli ol mil simplaj esperantistoj kaj ŝatantoj de Esperanto.

Kino sen limoj

Internacia sendependa kinofestivalo
en internacia lingvo Esperanto

Aleksander OS-
INCEV, kreanto kaj
kun-ordiganto de la
kino-festivalo:

“La ideo organizi Esperantan Kinofestivalon venis al mi ne hazarde, jam dum kelkaj jaroj mi kunordigas internacian teamon el pli ol 40 esperantistoj el kelkdeko da landoj, kiujn unuigas volontula projekto de tradukado de subtekstoj Filmoj.net. Tiu projekto donas ancon al iu esperantisto spekti atatajn filmojn, famajn filmojn a male tute nekonatajn kun subtekstoj en la internacia lingvo. Kaj iam mi decidis, ke necesas supreni i al nova nivelo kaj prezenti Esperantan kinarton por la tuta mondo! Ni penos sekvi dum la kinofestivalo la efajn fundamentajn ideojn, kiuj akompanas Esperantomovadon dum la lastaj 120 jaroj: malfermiteco, foresto de politika, socia kaj lingva cenzuroj, subteno de lingva kaj kultura diversecoj”.

Unu el specifaj trajtoj de organizado de la kinofestivalo estas tio, ke ĉiu laboro pri organizado efektiviĝas en interreto: kvin apartaj grupoj, konsistantaj el esperantistoj el diversaj landoj, prizorgas kvin ĉefajn organizajn direktojn de tiu granda internacia aranĝo. La oficiala retejo de la kinofestivalo estas

kinofestivalo.org. Ĝi en tri lingvoj informas pri freŝaj novaĵoj, konkursaj kondiĉoj, prezentas konkursajn videojn kaj nekonkursajn filmojn. Kiu ajn povas partopreni la konkursan programon kaj plenigi aliĝilon rete. La oficiala partnero de la kinofestivalo estas Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO).



Dokumentfilmo dublita en esperanton pri la polaj enmigrintoj en tropika regiono de Argentino



Humura filmeto en la angla kun esperantaj subtekstoj

Akiri eksterlandajn merkatojn kaj partnerojn: komerca filmeto en E-o

Aplikado, uzo de Esperanto en la normala ekonomika, komerca vivo estas malnova revo, sed ĝia realigo ĉiam trafis barojn kaj malhelpaĵojn.

En la nuna epoko de globaliĝo, lertaj homoj tamen pli kaj pli ofte trovas merkatajn breĉojn, kie ili povas utiligi la Esperantajn internaciajn kontaktojn. Tiaj estas ekzemple kelkaj negocoj ĉe la IKEF-listo, krome la sporadaj E-lingvaj retejoj de kafmaŝinoj ĝis pakad-aŭtomata grandfirmao.

Freŝa novaĵo estas la uzado de Esperanto por trovi internaciajn kontaktojn kaj klientojn en komerca sistemo MLM pri purigiloj de bastovartejoj kun emfazite naturamika trajto.

Itala esperantisto Luciano Viviani zorgis pri Esperanto-tradukado de interesa kaj spektinda produkto-prezenta filmeto.

Ĝi estas interesa kaj por ŝatantoj de naturo kaj de naturamikaj principoj, same por interesiĝantoj de la enfilme reklamita produkto, sed ĝi povas esti modelo-dona ankaŭ por multaj aliaj aktivuloj, agantaj en sfero de komerco aŭ reklam-scienco.

Fonto: ret-info

Jarmilaj Evoluigaj Celoj

La Jarmilaj Evoluigaj Celoj (JEC) de la Unuiĝintaj Nacioj estas grupo de ok celoj, kiujn ĉiuj 192 membroŝtatoj de la UN konsentis plenumi antaŭ 2015. Ili estis aprobitaj en la kunveno okazigita en septembro 2000 en Novjorko. Kompreneble tiuj celoj estas esencaj por la homaro, ĉefe por la neevoluintaj landoj kiuj suferas malriĉecon kaj mankon de la esencaj vivkondiĉoj.

Tiuj evoluigaj celoj estas la jenaj:

1. Elradikigi ekstreman malriĉecon kaj malsaton:

➤ Duonigi la nombron de personoj kiuj vivas per malpli ol unu dolaro tage.

➤ Duonigi la nombron de personoj kiuj suferas pro malsato

Oni devas klarigi ke tiu ĉi celo progresigis sufiĉe bone dum la lastaj jaroj, sekvante la konkludojn de tiu Novjorka kunsido investi unue por la infanoj kaj plej malriĉaj komunumoj. Se oni investos unu plian miljonon da dolaroj en la infana sano, oni sukcesos redukti lian mortecon ĝis 60%.

2. Atingi universalan elementan edukadon

➤ Certigi ke ĉiuj geknaboj finu elementan lernejon.

➤ Kvankam la meznombra kvanto je unua instruadperiodo pliiĝis ĝis 84% mondscale, ankoraŭ estas pli ol unu miliardo da infanoj sen lernejo. Estas

Neregistaraj Organizoj (NRO) kiel *Unicef* kaj aliaj kiu zorgas pri tiu lerniga celo.

3. Antaŭenigi seksan egalecon kaj doni povon al virinoj

➤ Elimini seksan malegalecon en elementa kaj meza edukado prefere antaŭ 2005, kaj je ĉiuj niveloj antaŭ 2015.

➤ En neevoluintaj landoj oni kutime preferas la instruadon de viroj rilate al tiu de la virinoj kaj krome, virinoj edziniĝas tre junaj, kio malhelpas la lernejan epokon en ilia vivo. Oni devas helpi la malriĉajn familiojn por ke ili povu permesi la junulinojn iri al la lernejo, studi kaj partopreni en la socia vivo de ilia komunumo, eĉ havi superajn studojn.

4. Redukti la nombron de infanaj mortoj

➤ Redukti per du trionoj la nombron de mortoj inter infanoj sub la aĝo de kvin jaroj .

➤ Verdire tiu celo evoluas bone, ĉar laŭ la lastaj informoj la nombro da infanaj mortoj en 2009 estis preskaŭ 8,1 milionoj rilate la 12,4 milionoj de 1990. Pro tio estas esence ne nur eduki la patrinon sed ankaŭ plibonigi la higienajn hejmkondiĉojn kaj havi aliron al trinkebla akvo, tio kio en multaj popoloj estas neeble kaj kaŭzas multajn mortojn, ĉar oni kalkulas la mortojn de 4.500 infanojn ĉiutage pro tiu akvomanko. Fakte pli ol unu miliardo da personoj ne havas aliron al akvo, kaj multaj aliaj al higienaj sistemoj.

5. Plibonigi patrinan sanon

- Redukti per tri kvaronoj la patrinan mortoproporcion.
- Kvankam en la evoluintaj landoj tiuj patrinaj mortoj okaze de naskiĝo da infanoj reduktiĝis ege, en la malevoluintaj landoj tiu problemo estas ankoraŭ ofta. Ekzemple, en Hindujo okazas po 450 patrinaj mortoj ĉiu 100.000 naskiĝoj, dum en landoj kiel Hispanio la proporcio estas po 4 forpasoj ĉiu 100.000 naskiĝoj. Ni scias ke infano sen patrino mortas multe pli ofte, post la naskiĝo, ol havante patrinon, kaj la NROj konas bone la problemojn de tiaj infanoj kiuj vagadas tra la straton de malriĉaj urboj serĉante ion por manĝi.

6. Kontraŭbatali HIV/aidoson, malarion kaj aliajn malsanojn

- Haltigi kaj komenci retroturni la disvastiĝon de HIV/aidoso
- Haltigi kaj komenci retroturni la oftecon de malario kaj de aliaj ĉefaj malsanoj.

Multaj malsanoj kiuj en evoluintaj landoj ne estas tiel gravaj, en ne-evoluintaj landoj kiel multaj en Afriko aŭ Azio, signifas la morto pro manko de kuraciloj. Pro tio la NROj kiam temas pri patrino kun aidoso klopodas eviti ĝian transigon al la infano antaŭ la naskiĝo, kaj uzi medikamentojn dum la infana juneco. Krom tio estas jam malkovritaj medicinoj por aliaj malsanoj, kiujn la transaciaj entreprenoj ofte ne interesiĝas kunporti al tiuj landoj, ĉar ili serĉas pli da monprofiton en la evoluinta mondo.

7. Certigi median daŭripovon

- Integri la principojn de daŭropova evoluo en landajn politikojn kaj programojn; retroturni perdon de mediaj rimedoj
- Duonigi la nombron de personoj sen daŭropova aliro al sekura trinkakvo.
- Atingi signifan pliboniĝon en la vivo de almenaŭ 100 milionoj da kvartalaĉaj loĝantoj ĝis 2020.
- Gardi la medion estas ne nur esenca kondiĉo por la sano kaj la ekonomio en la mondo, sed por la vivo de la nuna homaro en nia planedo. Se ni ne sukcesas ŝanĝi niajn kutimojn, redukti aŭ eviti polucion en la aero, en la maroj, en la tero, la venontaj generacioj ne povos plenumi la daŭropovan evoluigon kun bonaj vivkondiĉoj, kaj tamen ili rajtas ricevi de niaj manoj, mondon pli pura ol la nia. La manko de akvo estas tre grava problemo kiu kaŭzas la sekecon de la grundoj, morto de bestoj kaj malsanoj kaj mortoj de personoj, ĉefe infanoj.

8. Starigi tutmondan partnerecon por evoluado

- Pluevoluigi malferman negocan kaj financan sistemon regulbazitan, prognozeblan kaj nediskriminacian. Tio inkluzivas dediĉon al bona regado, evoluigo, kaj malriĉoredukto, nacie kaj internacie.
- Alfronti la specialajn bezonojn de la malplej evoluintaj landoj. Tio inkluzivas sentarifan kaj senkvotan alirpovon por eksportoj; plibonigitan ŝuldoredukton por malriĉaj landoj kun pezaj ŝuldoj; nuligon

UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj

de oficialaj duflankaj ŝuldoj; kaj pli malavaran oficialan evoluhelpon por landoj dediĉitaj al malriĉoredukto.

➤Alfronti la specialajn bezonojn de teroĉirkaŭitaj landoj kaj malgrandinsulaj evolulandoj.

➤Inkluzive trakti la ŝuldajn problemojn de evoluantaj landoj per naciaj kaj internaciaj iniciatoj por igi ŝuldojn longdaŭre elteneblaj.

➤Kunlabore kun la evoluantaj landoj, evoluigi decan kaj produktivan laboron por la junularo.

➤Kunlabore kun farmaciaj firmaoj, doni aliron al preze tolereblaj esencaj medikamentoj en evoluantaj landoj kaj kunlabore kun la privata komerco, alirebligi la avantaĝojn de la novaj teknologioj – precipe informaj kaj komunikaj teknologioj.

Ni jam estas en 2011 kaj la celoj de la Jarmilo devos esti plenumataj en 2015. Ĉu ni pensas ke ni sukcesos ĝin favore? Mi multe timas ke la internaciaj registaroj, kiel preskaŭ ĉiam, promesas sed ne donas la promesitan helpon, la ŝuldoj de la malriĉaj landoj estas pli kaj pli altaj kaj la nuntempa ekonomia krizo tute ne helpas tiujn deziratajn celojn.

Maria Rafaela Uruëña



Kadre de siaj oficialaj rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj UEA rajtas akrediti reprezentantojn ĉe la oficejoj de UN. Surbaze de la decido de la Estraro la Ĝenerala Direktoro liveris al la monda organizaĵo rajtigilojn por 11 reprezentantoj en la kalendara jaro 2011.

Ĉe la ĉefa sidejo de UN en Novjorko la ĉefreprezentanto de UEA estas Humphrey Tonkin. Aldonaj reprezenantoj estas Neil Blonstein, Thomas Eccardt kaj Scott Page. Blonstein krome laboras kiel volontulo en la Novjorka Oficejo de UEA. En Vieno la ĉefreprezentanto de la Asocio estas Hans Michael Maitzen, dum Gregor Hinker kaj Stella Maitzen estas aldonaj reprezentantoj. La estrarano de UEA pri eksteraj rilatoj Stefano Keller estas la ĉefreprezentanto en la UN-oficejo en Ĝenevo, asistata de Charmian Common, Nicole Margot kaj Francesco Reale.

Fonto: Gazetara Komunikado de UEA

Junularo aktivas en Hanojo



Kvin junaj esperantistinoj. De maldekstre: Trang, Animo, Flama Floro, Raquel kaj Majo



Augusto inter la studentoj

Nuntempe mi troviĝas en Hanojo, Vietnamio, post mia 4-jara instruado en Kantono, Ĉinio

Ekde la komenco mi ege surpriziĝis pro la alta nivelo de Esperanto ĉi tie. Multaj homoj entuziasme lernas nian lingvon, kaj ankoraŭ estas multaj kandidatoj por lerni ĝin.

Nun mi instruas Esperanton al du grupoj de universitataj gestudentoj, al alia grupo kiu konsistas el instruistinoj de infanĝardeno, kie okazos la Infana Kongreseto, al du grupoj de miksitaj aĝoj, kaj tuj mi komencos instrui Esperanton al tria grupo de universitataj gelernantoj.

Kion mi vidis ĉi tie estas ke homoj ne nur ŝatas lerni la lingvon, sed, diference de aliaj lokoj, ili havas Esperanton en la koro, ekde la komenco. Ne oni bezonas konvinki ilin. Ili entuziasme, kaj tre rapide lernas kaj volas tuj esti parto de la movado, helpi ĝin, kaj kunlabori kiel volontuloj en la organizado de la UK kiu okazos en Hanojo en la jaro 2012.

Kaj, ankaŭ diference de aliaj mondo-partoj, ili ŝatas paroli Esperanton. Ili tute ne emas krokodili. Ĉiuj volas tuj komenci uzi la lingvon. Tio multe plifaciligas mian laboron kaj kortuŝigas min.

Kompreneble por mi tio estas granda plezuro. Ĝenerale kiam mi instruas Esperanton la gelernantoj diras al mi, ofte: "bonvolu iri malrapide". Sed ĉi tie okazas io aliel. Ili diras: "rapide, rapide, ni devas fini la libron tuj". Granda plezuro estas instrui en ĉi tiuj kondiĉoj.

Kaj interesa fenomeno estas ankaŭ ke vietnamoj detruas pedagogiajn teoriojn, kiuj diras ke post 50-jaraĝaj homoj ege malfacile lernas novan lingvon. Unu el la grupoj kiuj lernas kun mi konsistas el maljunuloj, inter 65 kaj 93 jaraĝaj. Kiom ĝentilaj ili estas, kiel entuziasmaj, kiel diligentaj. Jam ĉiuj, post mallonga tempo, paroletas en Esperanto. Kompreneble, mi ne devas tion kaŝi, ili havas altan kulturen kaj profesion nivelon (armea kuracisto, kolonelo; universitataj profesoroj; inĝenieroj, ktp). Certe ili estos granda helpo en la organizado de la UK.

Kaj, kion diri pri la vietnama junularo? Mirinda. Ili ne estas la estonteco de la movado, sed jam realaĵo. De ĉiuj miaj junaj gelernantoj mi mem lernas multe. Ili rapidege lernas. Ĉiuj estas talentaj. Ĉiuj havas Esperanton en la koro. Laborante kun ili mia koro plijuniĝas. Kelkaj el ili jam multege laboris ĉi tie en la organizado de naciaj kaj internaciaj e-aranĝoj, kiel IJK, Tutazia Kongreso, Komuna Seminario. Ilia helpo estos ege valora por la UK. En tio multe helpis Flama Floro kaj Belinda, entuziasmaj kaj kapablaj knabinoj.

Speciale mi volus mencii Raquel. Meze de januaro, okaze de la lerneja vintra feriado ŝi decidis partopreni rapidkurson en Ĉinio, en la urbo Kantono, sur la gvido de la usona profesoro Dennis Keefe. La rezulto estis mirinda, ne kredebla. La kurso daŭris unu monaton (po ok horoj tage). En tiu tempo Raquel (ŝi havas hispanan nomon, ĉar ŝi estas studentino de hispana lingvo, kiun ŝi perfekte parolas, en la Universitato de Hanojo) akiris tre altan nivelon en la kono de Esperanto. Fakte kiam mi konatiĝis kun ŝi ĉiam ŝi parolis kun mi en la hispana lingvo, sed nun, kiam ni renkontiĝas, al ŝia buŝo venas nur esperantaj frazoj.

Baldau ŝi komencos instrui Esperanton, kaj multege helpas en la organizado de la kursoj de Esperanto.

Augusto Casquero

Gramatika kontrolilo por Open Office!

La gramatika kontrolilo Lingvollo-1.2 (LanguageTool-1.2) haveblas ekde nur kelkaj tagoj (2010/01/02) kaj nun funkcias en la lingvo internacia (inter multaj aliaj lingvoj).

Kio estas Lingvollo? Lingvollo estas libera (LGPL) plurlingva gramatika kontrolilo por OpenOffice (LibreOffice). Tio estas, ĝi atentigas pri gramatikaj eraroj kiel ekzemple: "Mi lernas *Esperanto*" (mankas akuzativo). Lingvollo ne atentigas pri literumaj eraroj kiel: "Mi lernas *Esperton*" sed eblas uzi literuman kontrolilon kune kun gramatika kontrolilo por atentigi pri ambaŭ tipoj de eraroj. Lingvollo ankaŭ funkcias el komanda linio por tiuj, kiuj preferas ne uzi OpenOffice.

-Pli da informoj (ekranfotoj, instrukcioj por instalado, ktp) tie: dominiko.livejournal.com/tag/lingvoilo

-Hejmpaĝo de Lingvollo (*LanguageTool*): www.languagetool.org

- Elŝutebla dosiero de Lingvollo-1.2: <http://www.languagetool.org/download/Languagetool-1.2.oxt>

Espereble iuj trovos ĝin utilan.

Dominique Pellé
[dominique.pelle\(ce\)gmail.com](mailto:dominique.pelle(ce)gmail.com)

Novaj iloj: Podkastaro kaj Simpla Vortaro


Ni intervjuas S-ron Vilfredo, kiu kreis ambaŭ novajn ilojn.

Juanjo: *Saluton Vilfredo. Dankon por respondi al niaj demandoj. u vi povas rakonti iomete pri vi?*

Vilfredo: Saluton Juanjo! Mi estas brita Esperantisto kaj mi esperantiĝis dum kristnasko 2008. Mi ankaŭ estas komputikemulo kaj ukuelelo-ludisto. Mia laboro estas profesia programado. Mi faras miajn projektojn ne por esperantistigi la mondon, sed por helpi la hodiaŭan esperantistaron.

Ni komencu parolante pri Podkastaro. Kio estas Podkastaro?

Podkastaro estas retejo, per kiu oni povas aŭskulti podkastojn (rekte tradukebla kiel guŝ-elsendojn (noto el la korektisto)) (ankaŭ foje nomita “retradio”). Hodiaŭ ĝi enhavas 21 podkastojn, sed ne ĉiu ankoraŭ elsendas. Sur la ĉefa paĝo oni povas aŭskulti la plej novajn epizodojn, aŭ oni povas trovi specifajn.



la podkastaro kunigas la plej novajn programojn

Kiam kaj kiel vi ekhavis la ideon krei la retpa on de Podkastaro?

Ĉe universitato mi ofte aŭskultis britan radion dum tagmanĝo, sed unutage mi ekpensis pri uzi tiun tempon por Esperanto. Mi serĉis bonan ilon por sekvi plurajn podkastojn, sed neniu vere plaĉis. Tial mi decidis mem fari ilon. Mi ne ege preferis fari retejojn, sed mi konkludis ke tial, mia ilo estus laŭeble plej utila.

Kiam mi faras projektojn, mi nur faras la plej malmulton por sukcesi. Poste, mi vidas se mia projektoj estas uzataj de homoj krom mi. Podkastaro estas tia (tage po dudek vizitantoj), tial mi refaris la retejojn dum marto. Nun ĝi enhavas pli da podkasto, estas pli bela kaj ĝi ankaŭ havas arĥivojn (kiuj mankis antaŭe).

Mi rememoras, kiam mi komencis lerni Esperanton, ke, por kapti la elsendojn de Radio A strio, mi devis atenti pri la horo, kapti per la radio-aparato, la radio-stacion, ktp. Certe, malfacila laboro. Nun, kun MP3 a en retpa o j kiel Podkastaro oni vi povas ricevi la diversajn podkastojn kiuj ekzistas kaj a skulti ilin kiam kaj kie oni volas.

Ni devus eterne danki al la Reto pro tio – inter aliaj iloj – ar nun estas tre facile a di Esperanton, u ne? u vi samopiniat?.

Jes ja, estas multe pli praktika nun. Mi povas aŭskulti laŭ mia libertempo (kaj horzono!). Por mi, podkasto estis bonega metodo por progresi post la

nivelo de “mi komprenas iom de la gramatiko”. Ili ankaŭ havas la grandan avantaĝon ke oni povas paŭzi, reaŭskulti aŭ eĉ preterpasi partojn laŭvole.

Tamen mi iom bedaŭras, ke ne estas Esperanta radiostacio. Mi scias ke estas homoj kiuj pensas pri tio, sed eĉ simpla podkasto ja estas laboro por fari ĝin regule.

Nun en Podkastaro estas pli ol dek-kvin radio-estacioj kiuj elsendas podkastojn. u vi gredas, ke la movado de podkasto en Esperanto havas bonan "sanon"?

Mi ĝojas pri ĉiu podkasto, kaj certe ne volas malkuraĝigi la laboremajn podkastistojn kiuj elsendas ĉi tiam. Kiam mi ekscias pri nekonataj podkasto (se ili ĵus naskiĝis, mi ĝojas plu) mi provas rapide aldoni ilin. Ĉi tio iĝis pli facila post la lanĉo de la dua versio.

Sed kiom da podkasto esperantujo bezonas por “bonan sanon”? Jes, mi bedaŭras, kiam podkasto ĉesiĝas, sed nenio daŭras ĉiame. Estonte, mi celas konservi sondosierojn por estonta aŭskultado. Tio ne eblas hodiaŭ per Podkastaro, ĝi bezonas, ke la origina retejo estas ankoraŭ uzebla. Mi gredas, ke podkasto kun bona sonkvalito ne perdas ties valoron rapide.

Mi gredas, ke, iom-post-iom, la kreado iĝos pli facila por eblaj podkastontoj, danke al teĥnologio. Sed ĝi ĉiam bezonos entuziasmon.

Nun, estas tre facila fari podkastojn. Kial ne existas, la via opinio, pli multaj podkasto en Esperanto?:

Vilfredo: Asocioj ŝanĝiĝas kaj homoj okupiĝas. Estas malfacile daŭre elsendi. Se ni povas pliigi konektecon de nuntempaj podkasto, espereble ni povas konservi la pasiecon de kreemuloj. Mi esperas, ke Podkastaro povas helpi tiel.

La via opinio, kia devus esti podkasto por ke i estos interesa al la esperantistoj?

Ha, malfacila demando. Bona sonkvalito ja helpas, sed nur malofte tio estas problemo. Pli bona estas mallongaj epizodoj ol pli longaj kun paŭzoj aŭ tro malrapida parolado. Mi ankaŭ gredas, ke intermiksita muziko vere pliboniĝas la etoson. Aŭ novaĵoj aŭ intervjuado -- ambaŭ interesas la plejmulton.

Indas mencii ke Podkastaro inkluzivas Radion Vatikanan. Sendube tio ne ĉiun interesas. Mi pensadis pri ĉu aldoni ĝin sed konkludis, ke mi estu inkluzivema. Tial klare oni ne bezonas allogi ĉiun esperantiston per la temo de la podkasto. Tamen pli ĝeneralaj temoj (novaĵoj, ktp.) interesas pli da aŭsultantoj kaj verŝajne estas pli plezura por la podkastisto(j).

Juanjo: u vi kredas ke la podkasto, enerale, da ros a ili estos superotaj de alia te nologia o?

Vilfredo: Ili daŭros, ĉar mi ne povas imagi io kio estas ĉiel pli bona. Televido ne mortigis radion. Sendube la precizaj teĥnikaj detaloj ŝanĝiĝos, sed la baza ideo (konservitaj sondoserioj de parolado kaj muziko) daŭros.

Kaj nun, ni parolu pri Simpla Vortaro.



Simpla Vortaro, utila helpilo
simplavortaro.org

Mi konfesas ke, por mi, Simpla Vortaro estas tre utila, kaj mi kutime uzas ĝin.

PIV, ReVo, ktp., kaj, nun, Simpla Vortaro kiu estas, kiel diri, spegulo de ReVo. u i estis bezonata?

Jes! (sed mi konfesas ke mi estas neneŭtrala) Nun ekzistas (laŭ mia scio) du ĝeneralaj retaj vortaroj: ReVo kaj la vortaro de Lernu. Lernu ne komprenas vortfaradon, kaj ReVo ne komprenas pluralojn. Ambaŭ ne komprenas mistajpitajn vortojn.

Mi volis vortaron, kiu komprenas vortojn kiel ili estas uzataj. Hodiaŭ mi serĉis la vorton “cinikecon”. Neniu alia vortaro komprenis ke tio estas kunmetitaĵo de “cinika” kaj “eco” kun akuzativo. La Simpla Vortaro ankaŭ komprenas la x-sistemon, la h-sistemon, pluralojn kaj eĉ provas diveni mistajpitajn vortojn.

Mi ankaŭ volis ligeblan vortaron. Estas preskaŭ malebla rekte ligi al difinon en alia vortaro.

(Indas menci ke ankaŭ ekzistas specialaj vortaroj: ekz-e Komputeko, kaj ViVo.)

u Simpla Vortaro estas nur via projekto a la homoj povus kunlabori kun vi por "plibonigi" in?

Ĉi-momente, ĝi estas nur mia laboro. La kodo estas facile havebla (<https://github.com/Wilfred/simpla-vortaro>) kaj libera, sed mi skribis ĝin en la angla (programado en Esperanto multe malrapidigas min bedaŭrinde). La difinoj estas la bonegaj difinoj de ReVo. Do, La Simpla Vortaro estas pli-malpli nur kapabla serĉilo por ReVo. Tial la kodo estas plejparte malsimplaj iloj por kelkmaniere serĉi. Sed multaj afablaj homoj kontaktis min kiam ili trovis cimojn, kaj tio egale valoras.

En via opinio, kia devus esti elektronika vortaro por esti praktika?

Vilfredo: Unue, ĝi devas enhavi tre multajn difinojn. La redaktantoj de ReVo (la tiel nomitaj “ReVuloj”) profunde diskutas stilon kaj bonecon de vortoj, sed kiam oni serĉas vorton oni deziras difinon malgraŭ ĝia boneco aŭ malboneco. ReVo saĝe havas difinojn kun notoj, por diri kiuj vortoj estas evitindaj.

Due, ĉiuj Esperantistoj devas kapable diskuti kaj kontribui. ReVo estas tia (sed redaktado ne estas facila), kaj la reta PIV estos tia ankaŭ. Lingvoj ŝanĝiĝas kaj novaj vortoj por novaj aĵoj aperas, tial vortaro devas kreski. La disputado / disputado mem valoras (mi multe lernis per legado de la dissendolisto de ReVo

(tech.groups.yahoo.com/group/revuloj/)
sed interkonsento ne ĉiam eblas.

Juanjo: Nun, kun porteblaj komputiloj kaj aliaj iloj kiuj oni portas kutime en sia po o, u vi kredas ke tio estas la komenco de la fino de la diversaj vortaroj sur papero?.

Oni ĉiam trovas min ĉe kongresoj kun eluzita papera vortaro angla-esperanto. Ofte estas pli facila serĉi libron ol tajpi sur ia porteblaĵo. Tamen ambaŭ valoras, kaj mi ne ĉiam havas mian paperan vortaron. Mia poŝtelefono estas ĉiam havebla, do... ni vidos.

*u Simpla Vortaro estas finita [retejo]
a ankora vi laboras pri i?*

Mi havas liston de forigitaj cimoj, kaj kelkaj ideoj por la estonteco. Ĝi plenumis mian originan ĉelon: tre kapabla serĉilo. Mi ankaŭ tre ĝojis, ke mi sukcesis fari vortfaradilon, ĉar mi eĉ ne estis certa ĉu ĝi estus ebla.

Pri la aliaj ideoj: mi volas plibonigeti la strukturon de la tekston, kaj ankaŭ havas malmultajn pli grandajn ideojn por la estonteco. Mi ne volas promesi antaŭ mi faris ion ajn. Sed mi ankoraŭ ĝuas la faradon, kaj multe mem uzas la vortaron. Ni vidos tion, kio okazos.

Mi estas scivolema, kiu libro estas tiu, kiu aperas en la retpa o. u ĝi estas esperanta libro?

Ne, mi nur elektis ĝin por stilo. Fakte, ĝi estas vortaro sed anglalingva vortaro montranta la vorton “fotado”. La fonto estas

flickr.com/photos/greeblee/3338710223/

Mi kore dankas al la S-ro Vilfredo por sia tempo kaj vortoj.

Vilfredo: Koran dankon. Se vi aŭ viaj legantoj havas demandojn aŭ ideojn, ne hezitu kontakti min:

lalingvisto.wordpress.com/pri-mi/

Retpaĝoj:

<http://www.podkastaro.org/>

<http://www.simplavortaro.org/>

Babiladoj en Katalunio

La 20an de februaro okazis babilado en Barcelona (Str. Josep Sangenis 28 baixos) kun la temo "Gepatroj-gefijoj-socio" Jen foto de la antaŭa renkonto en Sabadell



Brassens plu - Jacques Yvart



muziko, kaj ankaŭ muzikvideon de la kanto “La marista amo” filmita en la studio dum la registrado de la voĉoj.

Vinilkosmo

Por sia 29a albumo, Jacques Yvart elektis denove esperanton por fari tre belan omaĝon al Georges Brassens kies 90an datrevenon de lia naskiĝo kaj ankaŭ la 30an de lia forpaso oni celebras ĉijare (2011). Ses titoloj jam aperintaj en 1998 (Jacques Yvart kantas Georges Brassens – VKKD19) estis re-registritaj kaj remastrigitaj por tiu ĉi nova eldono, sed Jacques liveras al ni ankaŭ sep novajn juveletojn, “La marista amo” kaj “Oĉjo Leon” inter el la plej konataj kantoj. Tiu ĉi albumo donas al ni ankaŭ la okazon malkovri pli maloftajn kantojn kiaj “La longa vico”, “Milito”, aŭ “La lamanta reĝo”, kaj sen forgesi “Johano la neavertinto”, kiun Georges Brassens ne verkis sed kiun li tamen registris kaj kies muziko estis subskribita de... Jacques Yvart!

Por akompani sin en tiu vojiro, Jacques kunigis ĉirkaŭ si amikojn muzikistojn kun granda talento, ĉiu alportante sian tuŝon en la muzikaj aranĝoj kiuj foje mirigos vin. La amatoroj de Brassens estos ravitaj.

Ĉi tiu KD Ekstra entenas ankaŭ la instrumentajn titolojn laŭ MP3-formato por tiuj kiuj dezirus kunkanti kun la



Ekde la jaro 2003 "Kantaro-Vikio" (<http://kantaro.ikso.net/>) – alinome, "Libera Kantaro" - estas loko por ĉiu muzikema esperantisto, kie eblas trovi multegon da kantotekstoj, notoj, videoj kaj aliajn muzikaĵojn. Funkcia kiel vikio, ĝi ebligas komunan laboron de esperantistoj el diversaj mondopartoj.

En Kantaro-Vikio trovis sian duan vivon ankaŭ paperaj kantaroj. En speciala paĝo vi povas trovi liston de paperkantaroj kaj la kantotekstojn en ili.

Kiuj uzas Kantaro-Vikion? Ho! Komencantoj, gvidantoj de kursoj, amatoraj muzikludantoj, mem aŭtoroj kaj muzikistoj kaj finfine ĉiuj muzikemuloj! Se vi antaŭe ne vizitis nian vikion, ne prokrastu, eble vi trovos ĉe ni delonge serĉatan amatan kanton!

Grandan dankon! - Kaj nun venu, vidu, kunkantu! - Adreso de la libera kantaro: <http://kantaro.ikso.net/>

laŭ cirkulero n-ro 4 de Kantaro-Vikio
fonto: Ret-Info (mallongigita)

Hispana Esperanto-Kongreso

La programo de la 70-a Hispana Esperanto-Kongreso disvolviĝos laŭ la titolo: “Esperanto 3.0 – E-agado en la 21a jc / En esperanto en el siglo XXI”. La kerno de la programo celos analizi kiamaniere Esperanto adaptiĝos al la novaj uzoj de komunikado kiun la nuna epoko ebligas al la parolantoj, kaj montros la manieron en kiu la sinsekvaj generacioj de uzantoj kaj agantoj profitas el novaj informkanaloj.

Oni programos praktikajn ekzemplojn, en kiuj ni diskutos kaj utiligos novajn teknologiojn de eldonado, de distribuado de filmoj, de muziko. Malfermaj debatoj kaj atelieroj konsistigos centron de la programo pri la nunaj perspektivoj de la esperanta agado. Estos kundebataj la perspektivoj de la hispana movado, la organizado de Hispana Esperanto-Federacio aŭ la eldonado de ĝia bulteno.

La kongreso celas esti partopreniga. Tial, krom tradiciaj prelegoj, estas antaŭvidita prelegetaro, sub la formo de peĉakuĉo, en kiu povas partopreni kongresanoj sen antaŭa sperto uzi la lingvon publike. Estas programitaj ankaŭ atelieroj pri verkado, pri deklamado, pri uzo de Vikipedio, pri enretigo de filmoj, pri uzo de muziko.

Ankaŭ la pasinto trovos sian lokon, per ronda tablo dum kiu oni memoros la renovigon la movado 75 jarojn post la komenco de la civila milito.

Ne mankos kulturaj kaj distraj programeroj. Oni antaŭvidas muzikajn koncertojn, kiujn ni detaligos en postaj

komunikoj. Libroservo estos disponebla dum la tuta kongreso. Ludoj kaj aliaj amuzoj ne mankos dum diversaj momentoj de la kongreso.

Grava estos la turisma flanko, nepra en tiu historia urbo kaj ĉirkaŭo. Estas nun organizataj vizito en San Lorenzo de El Escorial, ekskurso al Segovia kaj La Granja, grimrado al proksima montaro, gvidata travizito al la fama Eskoriala Monaĥejo. La dimanĉon 3-an de julio, estas programata postkongreso en la ĉefurbo Madrido, dum kiu eblos viziti la urbon mem kaj kelkajn ĝiajn ĉefajn vidindaĵojn.

Se vi volas sugesti aliajn programerojn, aŭ se vi volas partopreni en iuj en la ĵus priskribitaj, ne hezitu kontakti la lokan organizantaron, en la adreso info@esperanto.es.

Ne perdu tiun ĉi ŝancon ĉeesti esperantan etoson. Estos loko por ĉiuj, junaj kaj veteranaj, hispanianoj kaj eksterhispaniaj invititoj, aktivuloj kaj amuzemuloj.

Jen la provizora programo:

Mardo 28-a

Akceptado
Ekskurso tra Eskorialo
Inaŭguro
Koncerto de plektorkestro
Interkona vespero

Merkredo 29-a

Ekskurso al Ávila
Ateliero: Tradukado (Antonio Valén)

Ateliero: Kantoj (M. Gutiérrez Adúriz)
Ateliero: Poezio (Jorge Camacho)
Ronda Diskuto: Historio
Prezentado: Filmoj en Esperanto
Prezento de novaj libro, inaŭguro de
libroservo

Ĵaŭdo 30-a

Ekskurso al montaro
Ateliero: Tradukado (Antonio Valén)
Ateliero: Kantoj (M. Gutiérrez Adúriz)
Ateliero: Poezio (Jorge Camacho)
Ateliero: Deklamado (Miguel Fernández)
Ronda diskuto: Organizado
Kunveno de asocioj
Muzika vespero
Ludoj

Vendredo 1-a

Ateliero: Vikipedio
Ateliero: Deklamado (Miguel Fernández)
Diskuto: Agado en la reto
Prezentado: Bitoteko
Diskuto: Estontaj eldonadoj
Ludoj
Kurso de Esperanto
Koncerto de koruso

Sabato 2-a

Ateliero: Vikipedio
KER-Ekzamenoj
Peĉakuĉo
Komuna manĝado
Vizito al monaĥejo
Adiaŭo

Dimanĉo 3-a

Ĝenerala Kunsido de HEF
Vizito al Madrido
Vizito al Prado-Muzeo

Oficialaj ekzamenoj

Hispana Esperanto-Federacio organizos la okazigon de la novtipaj KER-ekzamenoj en Hispanio la 2an de julio de 2011 dum la 70a Hispana Kongreso de Esperanto en San Lorenzo de El Escorial. La ekzamenoj okazos je ĉiuj tri ekzistantaj niveloj: B1, B2 kaj C1. Eblos trapasi la kompleksan ekzamenon (t.e. la skriban kaj la parolan parton), sed ankaŭ aparte iun el la du tipoj. Je sukcesa ekzameniĝo la ŝtate agnoskata hungara ekzamencentro ITK eldonos kvarlingvan diplomon por la kandidato.

La kotizoj de ekzameno estos jenaj:

Nivelo B1 skriba 34 €
B1 parola 34 €
B2 skriba 38 €
B2 parola 38 €
C1 skriba 42 €
C1 parola 42 €

La prezo de la kompleksaj ekzamenoj (skriba kaj parola) estas la adiciita sumo de la partokotizoj. Partoprenantoj en ekzameno kiuj ne estas membroj de HEF devos pagi 5-eŭran kotizon por kovri elspezojn de organizado. Membroj de HEF ricevos 5-eŭran rabaton. La pago okazos surloke la 2an de julio.

Por indiki vian intencon ekzameniĝi, bv skribi mesaĝon al *ker-ekzameno* @*edukado.net* kaj indiku la deziratan nivelon kaj tipon. Post tio la organizantoj kontaktos vin indikante la pliajn farendaĵojn.

Ĉu vi volas prelegi en la Hispana Kongreso?

Ĉu vi ŝatus prelegi en Kongreso, sed neniam kuraĝis ĝis nun?

Tiu ĉi 70-a Hispana Kongreso de Esperanto celas esti partopreniga, kaj la organizantoj volas kuraĝigi ĉeestantojn paroladi pri afero interesa por ili kaj por la aŭskultantoj. Sed ni ne deziras tro ŝarĝi la programon per longaj prelegoj, kiuj povus eventuale tedi la ĉeestantojn, kaj ni do deziras proponi la enprogramigon de nova maniero prezenti interesajn temojn al la publiko: peĉakuĉo.


Peĉakuĉo (kiu devenas el japana vorto kun la signifo babilado) estas maniero de prezentado tre rapida, en kiu sensekvo de prelegantoj parolas pri diversaj temoj, dum maksimumo de 6 minutoj kaj 40 sekundoj por preleganto. La kialo de tiu specifa tempo, estas ke oni utiligas po dudek bildojn, kiuj ilustras la temon, kaj kiuj pasas aŭtomate, kun daŭro de po dudek sekundoj ĉiu bildo. Do, prelegantoj havas apogon por la parolado, sed samtempe ili ne povas tro multe plilongigi sian eksplikon, ĉar la limon difinas ekstera proceduro.

Tio havas avantaĝon por la preleganto, ke oni ne devas mem zorgi pri troa strukturigo dum la prelego, kvankam necesas antaŭa provado por bone konduki ĝin. Tio estas des pli avantaĝa por homoj kiuj neniam antaŭe prelegis, aŭ havas dubojn pri sia propra kapablo, ĉu retorika, ĉu lingva. Ĝi ankaŭ estas avantaĝa por la publiko, kiu povos ĝui sinsekvon de interesaj prezentadoj en tre rapida kaj dinamika maniero.

Do, se vi interesiĝas, kontaktu la organizantojn por via preteco. Pretigu prezentadon laŭ komputila formato ppt, kun ĝuste 20 lumbildojn, aŭ, se vi ne bona mastras tiun manieron, uzu 20 simplajn bildojn. Sendu mesaĝon al [info\(ĉe\)esperanto.es](mailto:info(ĉe)esperanto.es) informante pri via preteco kaj ni informos vin pri la praktikaj detaloj kiel vi devas ĉion kompletigi. La temo estas libera, kaj ne nepre rilata al Esperanto, kvankam evidente la lingvo de la prezentadoj estas ĝuste Esperanto.

Kuraĝu. Vi certe ĝuos la sperton.

Tonyo



Aliĝilo

Mi volas aliĝi al Hispana Kongreso de Esperanto, kiu okazos en San Lorenzo de El Escorial inter la 28a de junio kaj la 3a de julio de 2011. Por registriĝo mi donas miajn datumojn:

Nomo kaj familinomo:

Naskiĝdato

Retpoŝta adreso:

Telefonnumero:

Lando:

Mi estas membro de HEF

Mi bezonas invitleteron

Laŭ sekva kotiztabulo mi pagos _____ eŭrojn en bankokonton de BBVA: 0182-1252-31-0204011961 (se vi estas en Hispanio) aŭ IBAN: ES85 0182 1252 31 0204011961 (el eksterlando).

	Aliĝo ĝis la 20-a de majo (1)	Aliĝo post la 20-a de majo (1)	Surtoka aliĝo
Membro de HEF	35€	45€	55€
Ne membro de HEF	40€	50€	60€
Juna membro de HEF (malpli ol 30)	25€	35€	45€
Junulo nemembranta en HEF (malpli ol 30)	30€	40€	50€
Invitletero	+5€		

- 1 La aliĝo estos konfirmata kiam oni ricevos la pagon.
- 2 Nur membroj kiuj pagis la kotizon de jaro 2010.
- 3 Naskiĝis en la jaro 1981 aŭ poste.